Estimataj Gekolegoj,

Kun granda gxojo mi informas vin pri tio, ke finpretigxis la modernigita sistemo en la **sekcio E-lernejoj**. Vi iam en la pasintaj du jaroj registris en tiu sekcio vian kurson, kiun vi gvidis inter oficiale agnoskitaj cirkonstancoj en institucio.

La listo pri tiuj kursoj havas gravan signifon kaj jam plurfoje utilis kiam aliaj kolegoj pledis por la enkonduko, oficialigo de la instruado de Esperanto.

Per la nuna mesagxo mi petas vin viziti la hejmpagxon kaj modifi tie la malnovajn informojn, aktualigi la datenojn pri via kurso.
Antaux ol vi komencas tiun laboron bv. atenteme legi la subajn konsilojn.
La informoj pri la unuopaj lernejoj estas publikaj.

1. 1 Ensaluto:

Por modifi la datenojn pri via kurso vi devas unue ensaluti al la pagxaro per viaj ensalutnomo kaj pasvorto.
Ensalutpagxo: http://www.edukado.net/pagina/login/183/
Se vi estas membro, sed vi ne plu scias vian pasvorton, fine de la pagxo: "**Cxu vi forgesis vian pasvorton?"** vi devas enskribi la retadreson (je kiu vi nun ricevis tiun mesagxon) kaj ene de sekundoj vi ricevas mesagxe la datenojn, per kiuj la ensaluto ne plu estos problemo.
Bonvolu memori: ne helpos denove aligxi kiel nova membro. La programo ligas la informojn al via **nuna konto**. Se vi volas sxangxojn, vi povas fari ene de gxi.

Ensalutinte en la pagxaron vi vidas vian profilon. Estus prakatike aktualigi ankaux tiun parton (sxangxi nomojn, pasvortojn, doni pliajn informojn, mendi servojn laux via placxo), kvankam la nuna peto rilatas ne precipe al tio.

1.2Kion faru la kolegoj kiuj gxis nun ne estis membroj?

Por tiuj kolegoj, kies kurso estis registrita, sed ili mem neniam estis membroj en la komunumo, nun devis esti kreita nova membrokonto. Por modifi la kursoinformojn ili devas agi same, kiel estas piskribita en la punkto 1.1.

2. Kiel modifi la informojn pri la kursoj?

Vi mem povas modifi la informojn **nur pri via propra lernejo**.
Malferminte ties detalojn vi vidas sube butonon, kiu invitas vin al la redaktado de la informoj.
Post la pusxo de tiu butono malfermigxas antaux vi la formularo, kie vi povas efektivigi la sxangxojn, aktualigi la informojn. Espereble cxio estos klara.

Bonvolu atente indiki la retadreson, gxi devos esti lauxregula. Se la kursgvidanto ne havas retadreson, la esprimo **"mi ne havas"** (sen citiloj) estas kion la programo akceptos.
La kursgvidanto kaj la informdonanto ne nepre devas esti la samaj, sed estus por ni praktike ricevi informojn rekte de la koncernuloj.
Bonvolu atenti ankaux pri la indiko de la kursodatoj. La malgxuste skribitaj datoj nuligxos. Se vi ne povas indiki precizan daton, aldonu klarigon en la kadro: rimarkoj.

Kiam vi estas preta kun la sxangxoj, bonvolu kontroli ke supre de la pagxo la eta **kadro ('aktivigu')**, kiu indikas, ke la informoj devas esti aktivaj, **havu la etan markilon**.

Se tiu kadro estas markita kaj vi savas la pagxon, viaj novaj informoj tuj estos publikigitaj en la listo. Bonvolu kontroli.
Vi kiam ajn povas reiri kaj modifi la informojn (cxiam ensalutante!).

3. Kion fari kiam la kurso ne plu estas aktuala?

Se via kurso ne plu funkcias, estas okazigata en alia lernejo aux estas iu alia problemo bv. malaktualigi la informojn.
En tiu kazo mi konsilas fari nenion, krom malmarki la supran kadreton, kiu indikos, ke la pagxo ne plu estos aktuala.
Ni intencas konstruigi arkivon kaj ne volas perdi la pasintecon. Eble tiuj eroj iam ankoraux utilos por statistikoj aux vi mem relancxos iaman kurson kaj tiam simple petos nin reaktivigi la eron, por ke vi povu fari sxangxojn sen devi reskribi cxion.
Do, simple malaktivigu la neaktualajn kursopriskribojn.

En la kazo, kiam sxangxigxis nur la kvanto de lernantoj, uzataj lerniloj, kursoperiodo ktp, simple modifu la datenojn. (Vidu la informojn en punkto 2.)

4. Kion fari, se vi hazarde malaktivigis la kursoinformojn?
Kion fari se vi post la aktualigo ne plu trovas vian kurson en al listo?

La kialo kusxas en la kadreto: ”aktivigu”.
En via formularo tiu kadro versxajne farigxis malaktiva. Ne paniku, estas ne grava problemo. Simple skribu al la adreso redaktanto@eduakdo.net kaj ni aktivigos la pagxon.
(Mi ne estos cxekomputile inter la 6a kaj la 17a de oktobro, tion bv. konsideri.)

5. Kiel registri novan lurson?

Tion faru en du kazoj.

1) vi havas plurajn diverstipajn kursojn pri kiuj informi eblas nur en apartaj folioj
2) vi malaktivigis iun kurson sed sxatus registri novan

Por nova kurso vi devas malfermi malplenan formularon. Tion vi povas fari sur al unua pagxo de la sekcio E-lernejoj http://www.edukado.net/pagina/E-lernejoj/154// en la rugxa strio, klakante al la indikita vorto. Por la plenigo legu la konsilojn en la punkto 2.

6. Kion faru tiuj, kiuj estas tutnovaj registrantoj?

Tiuj kolegoj devas unue registrigxi kiel membroj kaj ensalutinte ili tuj povas malfermi malplenan formularon en la maniero priskribita en la punkto 5.

Kaze de aliaj demandoj, levigxintaj problemoj bonvolu turni vin mesagxe al (redaktanto@edukado.net) kaj vi ricevos la necesan helpon.

Dankon por via instrulaboro kaj ties registrado.

Mi deziras al vi sukcesan kursgvidadon kaj esperas, ke la pagxaro kun siaj diversaj servoj bone utilos al vi.

Katalin Kovats, redaktoro